

Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuיןlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO

6 N° 4 APR, 1986

JAARGANG

ATENTINDAĴOJ :

VENONTA ESTRARKUNSIDO : SABATON 7-AN DE JUNIO 1986 EKDE 08.30 H.

ESTRARO kaj LABORGRUPOJ

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEEL (prezidanto) 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM
Jan BOVENDEERD (sekretario)
Speeltuinaan 14, 2510 MORTSEL
2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM
Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN
Roland ROTSAERT (estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04
Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN
3. INFORMADO GAZETARA SERVO
Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT
Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE
4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ
Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE
Albert CLAESEN 011/33 66 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK
Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM
5. GRUPA AGADO
Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST
Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts
Jules VERSTRAETEN (OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN
Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM.

PROTOKOLO

pri la estrarkunsido de sabato 19-a de aprilo 1986 en Antwerpen

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR)
kaj Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Paul Peeraerts, Edward Symoens kaj Hilde Vaningelgem

Komenca horo : 10.00 h.

Prezidas : ID

Protokolas : JB

1. La protokolo de la estrarkunsido de 15 03 86 estas aprobita.
- 1.2. Kvankam la protokolo pri la ĝenerala jarkunsido nun^{ne} estu preparolata, ID tamen insistas ke ĝi estu kompletigota, nome la superrigardo pri la grupaj aktivecoj (vidu INFORMILO 6/3 mart. 86, paĝon 14.)
Al la rubriko "ekspozicioj" aldoniĝu por Antwerpen la nombron 2
- 1.3. Sendube la kolumno rilate al Bruselo ankaŭ ne estas kompleta, sed ni ne ricevis pli detalan aŭ pli kompletan raporton.
- 1.4. Verŝajne ankaŭ pri aliaj grupoj mankas informoj, sed ni povas publikigi nur la ricevitajn donitaĵojn.
2. Taskodivido.
 - 2.1. Principe ne estas ŝanĝoj en la estraraj taskoj, krom por la financoj. Tie aldoniĝas Roland Rotsaert por la ĝeneralaj financaj aferoj. Dume restas Paul Peeraerts por la librotariado kaj Erik D'Hondt por la libroservo kaj turismo.
 - 2.2. ID konfirmas ke Kiki Tytgat pretas kunlabori en la estraro, sed por limigitaj taskoj, speciale pri instruado.
3. La organigramo ne povas esti preta antaŭ junio.
4. Aktivec-raportoj :
Marc Van den Bempt preparis novan aktivecraporton, pli praktikan. La estraro ĝin aprobas kaj dissendos ĝin al la grupoj post kiam la nova emblemo estos preta. Do, principe ne antaŭ majo.
5. Kongreso Blankenberge.
Nenia informo atingis nin de post la ĝenerala jarkunsido. Ankaŭ ne la, en la kongresa regularo postulata, buĝeto.
6. FINANCOJ : la financa situacio evidentiĝas esti sana.
7. VORTARO : la nova Prisma-vortaro ESPERANTO-NEDERLANDA-ESPERANTO estos prezentata al la nederlanda gazetaro je 22 04 1986 de " 't Spectrum "

8. Institucio HODLER.

Pri la kontrakto ankoraŭ ne estas konsento.

La estraro de IH konvenas denove je 20 04 1986. Ni atendu la sekvon.

9. PROPAGANDO (komisio pri -)

9.1. En ĝia nuna stato, la komisiono mem ne povas realigi la planojn. Ĝi jes priekzamenas kaj konsilas. Pri la praktika realigo (kontaktoj kun la diversaj instancoj k.s.) okupiĝas ĉefe ID.

9.2. Domstilo = emblemo

Tiu ĉi estos preta en majo.

Dezirinde estas ke ĉiuj niaj grupoj uzu ĝin, tiel ke en tuta Flandrio estu nur unu sola rekonilo pri Esperanto.

La emblemo estos prezentota al la grupoj kun eventuala reag-periodo.

Poste ĝi estos ĝenerale uzata.

9.3.1. GAZETARA KONFERENCO

ID sin demandas ĉu ne bonus profiti de la nova vortaro por organizi gazetaran konferencon. RR avertas tamen ne tro rapidi, ĉar li timas, ke la bindisto preparis nur kelkajn ekzemplerojn por la prezentado al la publiko. Do, konferenco nur post kiam la vortaro efektive alvenis.

9.3.2. Ni povus profiti de la sama okazo por prezenti ankaŭ la verketon de F. Van Dooren : "Kia Miksaĵo".

9.4. Rilate al la propaganda kampanjo, la estraro konsentas disponigi al la komisiono la informan fonduson.

9.5. EKSPOZICIOJ

Okazos surstrata ekspozicio en Kalmhout.

Alia ekspozicio okazos antaŭ longe en LIMBURG HAL en Genk.

10. INFORMADO

ES okupiĝas pri la kontaktoj kun BRT, radio kaj televido.

11. INTERGRUPA AGADO.

RR pledas por pli da kontaktoj inter la diversaj grupoj.

JB atentigas pri la intencoj de LA VERDA STELO, kiu decidis dediĉi la 5-an vendredon de la monato - se estas 5, kompreneble - al komuna programo kun aliaj grupoj. Tio signifas 4 en la jaro.

12. DIVERSAĴOJ

RR proponas venonte kunsidi pli frue en la mateno por se eble fini antaŭ-tagmeze, ekzemple ekde 08.30 h.

La ĉeestantoj konsentas. Se ankaŭ la aliaj, tiel estos.

Fino : 15.00 h.

Venonta kunsido : 07 06 1986 ekde 08.30 h.

JB

LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL. V.

S E N E L I R A J D I S K U T O J ?

En la antaŭaj artikoloj, mi ĉiufoje emfazis, ke Transakcia Analizo malaprobis nenion el la elementoj de la strukturanalizo.

Hodiaŭ mi volas iom nuanci tiujn diraĵojn. Mi intence prokrastis tion pro mia propra sperto.

Kiam mi ĵus konatiĝis kun TA, mi havis fortan inklinon por serĉi la fontojn de miaj malfacilaĵoj ĉe la aliaj. "Mi ja Plenkreskule analizas nian problemon, sed mia edzino ribelas Infane kaj ne volas aŭskulti miajn argumentojn. Do, vidu ! Ŝi kulpas ! " Aŭ " Mia estro Kritikeme Gepatre reagis al ĉiu bona propono ! Tion me ne daŭre eltenas."

Intertempe mi konsciiĝis, ke mi kreas miajn proprajn problemojn en mia propra menso. Mi diras ion, kaj mi direktas min al iu mensero ĉe la alia. Se mi ricevas respondon el alia mensero (krucita rilato), mi konsterniĝas, koleriĝas, sentas frustracion. Sed la rilatoj restas harmoniaj, ĉiam kiam mi ricevas respondon el tiu mensero, kiun mi alparolas : la paralelaj reagoj povas pludaŭri dum horoj : du patrinaj, kiuj plendas pri la konduto de siaj infanoj, havas neelĉerpeblan provizon da rakontaĵoj. Tio ne signifas, ke tiaj konversacioj estas fruktedonaj.

La Plenkreskulo kaj la Natura Infano estas pozitivaj. La menseroj el la Zorgema aŭ Kritikema Gepatro kaj el la Adaptita Infano havas pozitivajn kaj negativajn facetojn.

Ekz. Zorgema Gepatro⁽⁺⁾ vere protektas
Zorgema Gepatro⁽⁻⁾ tro ŝirmas. "Mi faros tion por vi. Vi neniam sukcesos!
Kritikema Gepatro⁽⁺⁾ difinas necesajn limojn kaj ordonojn.
"Vi ne rajtas fari tion. Tio estas danĝera !"
Kritikema Gepatro⁽⁻⁾ volas imponi, superregi.
"Vi ĉiam eraras, stultulo !"
Adaptita Infano⁽⁺⁾ estas ĝentila, akceptas aŭtoritaton.
"Jes, mi provas pensi pri via rimarko"
Adaptita Infano⁽⁻⁾ estas tro timema, ne kuraĝas malfermi la buŝon por diri sian opinion aŭ kontraŭe ekscitas, provokas, obstinas
"Neniam mi akceptos vian proponon, eĉ se la tuta mondo diras ke vi pravas !"

Ĉiu ajn ja havas ion da ĉio tio, sed aŭtonoma kaj respondeca homo havas plej multe da pozitivaj eroj.

Per tiaj klarigoj, mi volis unu plian fojon substreki, ke akiri pli bonajn interhomajn rilatojn komenciĝas per pli bona memkonsciigo : unue kompreni sin mem, poste la aliajn.

Sed se vi troviĝas en konflikto, vi spertos - post analizo - ke negativa reago provokis negativan krucitan reagon. La daŭrigo de tiaj reagoj ne solvos ^{la} problemojn, sed postlasos ĉe ambaŭ partioj pli kaj pli profundan senton de malbonfarto :

A - "Vi, stulta knabo, kion vi faraĉis en la lernejo ? " (KG-)

B - "Ĉu vi estis tiel bona por matematiko kiam vi estis juna ?" (KG-)

A - "Ho, vi sendanka stinkulo, se mi estus havinta viajn eblecojn.


Vi estas luksorkoj, ni devis labori hejme !" (KG-)

B - "Vi reagas kvazaŭ mi nenion faras. Kaj vi mem ĉiutage nur sidaĉas antaŭ via televido !" (KG-) ktp.



Por trarompi tian diskuton, oni povas finfine nur apelacii la pozitivajn erojn el nia menso, unuavice la Plenkreskulon aŭ ekzemple la sincere Zorgeman Gepatron ... " Knabo, kio okazis pri matematiko ? Ĉu vi faris la maksimuman streĉon ? Kiel vi povus eviti tian rezultaton denove ? "

Simila sinteno necesas, kiam ni konfrontiĝas kun antaŭjuĝoj pri Esperanto. ... " Kion vi scias pri Esperanto ?" (sed dirite kun scivolema voĉo kaj ne kvazaŭ instruisto en klaso) ... "Ĉu vi konas ĝiajn aplikeblecojn ? ... Ĉu vi jam aŭdis ĝin ? ... Ĉu vi jam vidis fakrevuojn ? ... " multe pli rezultos ol plej arda sed senelira diskutado.

ID.



BV. NE KROKODILI !





NE KROKODILU !

